



PILO-PRESS

Internacia Inform servo

N-ro 35/1972 7 nov 72
Aperas ĉiusemajne

Abonprezo por 1973

20,- GM

=====
Pagu jam nun!

=====
PSCHK Nürnberg
Nr. 819 56

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

La nova kadra programo de Pola Radio

Parolas Varsovio...

Novembro 1972 — Majo 1973

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la internacia lingvo du programojn:

6.00 h. — ondolongoj: 41 m, 49 m, 200 m
16.30 h. — ondolongoj: 31 m, 41 m

La horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo. Ĉiutage, escepte de la dimanĉoj kaj festotagoj, je la 16.30 h.:

— novaĵoj de la radia ĵurnalo,
— en ambaŭ elsendoj komentarioj, polaj kaj esperantaj temoj.

Lunde:

6.00 — „Esperanto-ekspreso” (ripeto de la dimanĉa posttagmeza programo; en pli longa versio)
16.30 — „Koncerto kun bondeziroj”

Marde:

6.00 — „Koncerto kun bondeziroj” (ripeto)
16.30 — „Pri kio oni parolas en Pollando?”; „El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio”

Merkrede:

6.00 — „Pri kio oni parolas en Pollando?” (ripeto); „El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio” (ripeto)
16.30 — „Anguleto de nevidantoj”; junulara magazino „Kune”; „Aŭskultanoj petas — ni disaŭdigas”; „Radia film-magazino” (sinsekve ĉiun merkredon)

Ĵaŭde:

6.00 — Ripeto de la merkreda posttagmeza programo
16.30 — „Leterkesto”

Vendrede:

6.00 — „Leterkesto” (ripeto)
16.30 — Literatura aŭ kultura programero

Sabate:

6.00 — Literatura aŭ kultura programero (ripeto)
16.30 — „La semajno en Pollando”

Dimanĉe:

6.00 — „La semajno en Pollando” (ripeto; en pli longa versio)
16.30 — „Panoramo de internaciaj eventoj”; „Esperanto-ekspreso”

ESPERANTO-ANGULETOJ EN LA NACILINGVAJ PROGRAMOJ DE LA POLA RADIO

En la germanlingva programo de la Pola Radio:
Dimanĉe: 22.00 h.; ondolongoj: 31 m, 41 m, 49 m.

En la svedlingva programo de la Pola Radio:
Marde: 17.00 h.; ondolongoj: 49 m, 200 m

En la danlingva programo de la Pola Radio:
Dimanĉe: 21.00 h.; ondolongoj: 41 m, 49 m.

La anguletoj estas kelkminutaj kaj ili pritraktas nur Esperanto-temojn.



Varsovio. Ekde la 6 nov 1972 validas la nova kadra programo por la Esperanto-Elsendoj de la Pola Radio. Kiel oni povas konstati, multaj ŝanĝoj ne okazis. Nur la rubrikoj "Pri kio oni parolas en Pollando" kaj "El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio" nun jam okazas marde posttagmeze kaj merkrede matene. Do, Varsovio ne estas por eksperimentoj, oni estas konservativa. Tamen mi ankoraŭ menciui unu ŝanĝeton, la matena programo gajnis unu plian minuton, ĝi nun fakte daŭras 30 minutojn

La nova programfolio jam aspektas 'kopernikeca'. 1973 ja estos la Kopernika jaro.

Speciale ni atentigas pri la Esperanto-anguletoj en la danlingva, germanlingva kaj svedlingva programoj. Vidu maldekstre!

Skribu al

POLA RADIO
Esperanto-Redakcio
Poŝtkesto 46
VARSOVIO — 1
POLLANDO

Novajoj
Informoj pri Pollando
Komentarioj
Esperanto-temoj
Kulturo
Literaturo
Muziko

Ĉu Esperanto-poŝtmarko okaze de la UK 1974 ?

Bonn (PP) En la letero de la 24 okt 1972 al s-ro August Wetterstein, Hattingen-Welper, la federacia ministro por poŝtaj kaj telekomunikaj aferoj informis, ke lia propono, eldoni poŝtmarkon okaze de la 59-a Universala Kongreso de Esperanto 1974, estos submetata en januaro 1973 kune kun la aliaj tiurilataj deziroj al juĝkomisiono. Laŭ la rekomendoj de tiu komisiono estos fiksita la eldonprogramo por la jaro 1974.

Pri instruado de fremdaj lingvoj

Milano (ades) Pri instruado de fremdaj lingvoj en la italaj lernejoj tenas letero, kiu estis publikigita la 15-an de oktobro en la itala ĵurnalo "Il Giorno", gazeto tre disvastigita kaj prestiĝa. En la letero, sendita de grupo da profesoroj pri germana lingvo, oni komunikas, interalie, ke oni sendis al la ministro pri publika instruado telegramon, por protesti kontraŭ la hanko de katedroj pri germana lingvo en la italaj lernejoj, kaj kontraŭ la forigo laŭgrada de la malmultaj, kiuj ankoraŭ ekzistas. en la sama telegramo oni ankaŭ postulas urĝajn decidojn por pli justa distribuo de la katedroj de fremdaj lingvoj en Italujo.

Lingvaj malfacilaĵoj

Romo (ades) Pri lingvaj malfacilaĵoj amplekse raportas la italaj ĵurnaloj, parolante pri la aviadila akcidento, kiu okazis apud Moskvo, en Sovetunio, la 13-an de oktobro. Oni substrekas, ke la okcidentlandaj ambasadorejoj ricevis la liston de la falintaj pasaĝeroj kun granda malfruo, ne nur pro la kutima neemo de la sovetaj instancoj paroli pri aviadilaj akcidentoj okazintaj al sovetaj aviadiloj, sed ankaŭ ĉar, laŭ oficiala deklaro de la ministerio pri eksterlandaj aferoj, ne estis facile kopii per latinaj literoj la liston de la pasaĝeroj, kiu estis verkita, originale, per kirilaj karakteroj.

Fama itala muzikisto kontaktis kun Esperanto

Romo (ades) Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de pastro Lorenzo Perosi, famkonata muzikisto, kiu precipe komponis religian muzikon, la ital-lingva gazeto "Famiglia Cristiana" memorigis, interalie, ke la muzikisto kontaktis kun Esperanto, kaj ke eĉ li kutimis skribi italan lingvon uzante la Esperantan alfabeton. Estas menciinde, ke la gazeto "Famiglia Cristiana" (Kristan Familio), kiu jam plurfoje menciis Esperanton en siaj artikoloj, estas verŝajne la plej disvastigita itala gazeto, kaj aperas en pli ol 1 miliono da ekzempleroj ĉiusemajne.

Nova prezo por ŝlosilo "Wir lernen Esperanto"

Limburg/L (PP) Aperis noveldono de la ŝlosilo por la germana Esperanto-lernolibro "Wir lernen Esperanto" de W. + H. Wingen, eldonita de Limburger Vereinsdruckerei. La nuna prezo estas 3,20 DM. La lernolibro mem kostas 4,60 DM.

Notindaĵo: Sub la rubriko "Interesaj artikoloj el la tri jarĉikolektoj" la germanlingva revuo "steno-jugend" (steno-junularo) mencias i.a. "Esperanto 1/72" Pilo-Press siatempe raportis pri tiu favora artikolo.